// TAMEN PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO APRILO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

*Malgranda Eileen retrovenas el la lernejo:*

*“Hodiaŭ ni bakis kukojn en la lerneja kuirejo.”*

*“Nu”, respondis la patrino, “ĉu estis permesite al vi manĝi ilin?”*

*“Ĉu permesite? Ni devis!”*

Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: ”Lingvaj Resondoj”.

Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.



*Diris la turistgvidanto: “Tiu ĉi rivereto estas subtera. Ĝi iom pli fore malaperos kaj reaperos en la drinkejo”.*

*“Precize kiel mia edzo”, ĝemis unu el la virinoj.*

## Gravaj Esperanto-eventoj

Dimanĉon la 2an de aprilo ni prenos parton en “Kajtotago” en Semaphore. Pliajn informojn donos Katja, telefono 8341 5506.

Merkredon la 5an de aprilo en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Indrani pri sia vivo.

Merkredon la 19an de aprilo en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Annie pri sia vivo.

Merkredon la 3an de majo en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Ashley pri sia vivo.

Sabaton la 13an de majo je la 17a horo okazos Teatraĵa Vespero (ĉiu el ni prezentu ion) ĉe Pat Palmer, 4/28 Hampton Street North, Goodwood, S.A. 5034, telefono 8272 1515.

Merkredon la 17an de majo okazos bonega kunveno en Clarence Park.

Ĝuu du kaj duonan tagojn da Vintrokursaro de “Esperanto en Sudaŭstralio” ekde la 2a ĝis la 4a de junio en Hackham South Primary School!

La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.

Sabaton la 24 de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.

Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolinmuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012, telefono 8268 4021.

La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.

*“Ĉu vi ofte parolas dum vi dormas, Trevor?”*

*“Ne, sed mi parolas kiam aliaj dormas”.*

*“Ĉu vere?”*

*“Jes, mi estas Esperanto- instruisto!”*

## Patricia Palmer


intervjuita de Katja

Pat naskiĝis la 16an de aŭgusto 1933 en vilaĝo Oxted en la suda regiono de Anglujo. Ŝia patro, Geoffrey Edmonds, estis pastro de protestanta religio. Ŝia patrino, Freda, estis unu el la unuaj virinoj en Anglujo, kiuj ricevis universitatan diplomon (pri fiziko). La familio, al kiu apartenis ankaŭ la frato de Pat, restis en Oxted, proksime al Londono, dum multaj jaroj. Tie Pat vizitadis la elementan lernejon kaj en



Sussex la mezan. Dum la jaroj 1952-55 ŝi studis la francan kaj la hispanan lingvojn en la universitato Sankta Andrews en Skotlando. Samloke studis sciencon Jack Palmer, al kiu Pat poste edziniĝis. Post la fino de la studoj sekvis du jaroj da laboro kiel lingvoinstruistino en lernejo por knabinoj kaj poste patriniĝo.

Jaro 1964: granda ŝanĝo – kun ekscito kaj samtempe malĝojo – ĉar la familio elmigris al Aŭstralio. La kialo estis laborposteno por la edzo de Pat. La familio ekloĝis en Kanbero (Canberra). Tie Pat vizitadis universitatan kurson pri biblioteka laboro kaj edukado (1970-73). Sekve ŝi iĝis bibliotekistino en diversaj elementaj lernejoj en Kanbero dum 17 jaroj.



## 1992: translokiĝo al Adelajdo kaj kurso pri konsilado

La unua informo pri Esperanto atingis Pat en 1997, kiam la UK okazis en Adelajdo. Unu aŭ du jarojn poste ŝi eklernis la lingvon helpe de Sandor Horvath kaj John Gallagher en la grupoj kunvenantaj en iliaj hejmoj. La vera entuziasmo venis post la partopreno en la Melburna Somerkursaro en 2000. Ĝin sekvis plia lernado en la grupo de Max Wearing kaj per la helpo de Bob Felby. En 2003 Pat prenis, en Melburno, parton en plia somerkursaro kaj landa kongreso de la Novzelanda EA en Velintono (Wellington). En 2005 ŝi mem kunorganizis somerkursaron – la Adelajdan. Jaron poste ŝi jam helpis instrui malgrandan grupon da interesiĝantoj en Black Forest kaj vojaĝis al Eŭropo por ĝui la Vilnan UK-n kaj semajnon da Esperantumado en Germanujo. Estis granda travivaĵo! Ĉi-jare ŝi ĝuis semajnon de la somerkursaro en Merimbulah (Novsudkimrujo) kaj daŭrigas la kurson kun la grupo, gvidata de Trevor Steele. Ŝi restas fidela ankaŭ al la klubaj kunvenoj.



Pat

El kiuj materialoj ŝi lernis nian lingvon? El pluraj ilustritaj tekstoj kaj poste el "Step by step in Esperanto" de Montagu Butler. Ŝi aparte ĝuas legi Esperantan literaturon (ŝi posedas dudekon da Esperanto-libroj kaj multajn revuojn, kantojn ktp.).

Pat fieras pri sia belega familio: 4 infanoj ( la filino Ruth mortis en 1994) kaj 5 genepoj. Ŝi ofte vojaĝas al Kanbero kaj Darvino (Darwin) por ĝui la kunestadon kun ili. Kun la filino Helen ŝi kunesperantumas ĉi tie en Adelajdo. Estas konate, ke ŝi ŝatas kanti (membras en ĥoro), skribi (skribadgrupo), legi, piediri, naĝi, vojaĝi (ŝi posedas ĉemaran ruldomon en Novsudkimrujo), teatrumi (dum kelkaj jaroj ŝi membris en la Opera-asocio en Kanbero kaj en Adelajdo ŝi ludis en la dramo "Virinoj de Trojo") … Pri siaj revoj kaj planoj ŝi diras: "Mi esperas vivi plene kaj aktive kiom eble plej longe kaj ĝui mian familion, amikojn, viziti belajn lokojn … kaj havi multe da ĝojo dum la Esperantaj aranĝoj."



Helena kaj Pat

***Jonas la forĝisto estis ne ekscitiĝema. Iun tagon vizitis lin leĝisto.***

***"Por vi mi havas bonajn, eĉ bonegajn novaĵojn", li diris. "Unu el viaj onkloj en Usono mortis testamentinte al vi ĉiun sian havaĵon, grandegan bienon en Teksako, du milionojn da dolaroj kaj hundon.***

***Jonas sidis tute senmove unu momenton. Tiam li demandis: "Al kiu raso apartenas la hundo?"***

## La tago de gepatraj lingvoj

La 21an de februaro estis la sesan fojon en la tuta mondo celebrata la InternaciaTago de Gepatraj Lingvoj. Ĉifoje UNESKO, la iniciatinto de la celebrado, intencis substreki la lingvan diversecon, alivorte la neceson pluteni la mondon lingve plureca. Interalie konferenco kun tiu temo kiel titolo okazis en la sidejo de Parizo kun partopreno de la plej altaj funkciuloj de la organizaĵo, ĝuste por marki la gravecon de ĝi!

Oni prezentis la sekvojn de la malapero de lingvoj kaj iniciatojn por malhelpi tiun malaperon en ĉiuj mondopartoj.

Apartan atenton oni dediĉis ankaŭ al la iniciato de la Afrika Unio, kiu deklaris la jaron 2006 "Jaro de Afrikaj Lingvoj" dum la speciala

kunsido pri Kulturo kaj Edukado de la Pintkonferenco en Ĥartumo fine de januaro.

Ankaŭ ĉijare la Esperanto-movado aliĝis al la celebrado de tiu tago, kies gvida ideo estas esenca parto de la idearo de la Esperanto-komunumo, kaj kiu koincidis kun la Semajno de Internacia Amikeco, iniciatita de Universala Esperanto-Asocio antaŭ kvar jardekoj.

Esperanto ne celas anstataŭigi aliajn lingvojn, sed nur utili kiel lingvo neŭtrala, ne portante la interesojn de tiu aŭ alia granda lando, kaj per tio mem protektanta ĉiujn lingvojn, grandajn kaj malgrandajn. La tago, cetere, estis kreita por doni atenton al la gepatraj lingvoj, kiuj estas lingvoj de malplimultoj enlandaj kaj de malgrandaj landoj en la monda sceno. La Esperanto-movado de ĉiam atentas pri tio kaj ni povas fieri, ke en ĉiuj situacioj ni provis fari ĉion eblan por favori per Esperanto ĝuste tiujn lingvojn.

Ni estas konvinkitaj pri tio, kion diris Gandhi pri la graveco de gepatraj lingvoj: "Vera edukado ne eblas per eksterlanda rimedo… sole la hejma medio povas stimuli spiritan originalecon en la plej multaj personoj, kaj samtempe pri tio, kion diris Zamenhof: La lingvo internacia deziras doni al la homoj de malsamaj popoloj nur la eblon komprenadi unu la alian, ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj.

Tiun koncepton resumas daŭre nia slogano "Ĉiu rajtas lerni sian gepatran lingvon kaj la internacian lingvon Esperanto", en la afiŝo subtene al la Tago de gepatraj lingvoj de Unesko, kiu estas elprenebla el la retpaĝoj de UEA: <u>http://www.uea.org/informado/gepatralingvotago.html>http://www.uea.org/informado/gepatralingvotago</u>.

*Renato Corsetti*

*"S.ro direktoro, mi aŭdis, ke vi serĉas kasiston."*

*"Jes, fakte mi serĉas du, la malnovan kaj novan!"*

## Al Esperanto en Sudaŭstralio pagis jam

**por 2006 la sekvaj entuziasmaj membroj:**

Arturo kaj Libby; Audrey kaj Bob; Jennifer; Katja kaj Trevor; Helena kaj Sandor; Indrani, Pat Palmer, Annie Gleeson kaj Ashley Campbell.

## Reprezentantoj kaj io en la ujo (Dua parto)

La artikoletoj aperintaj en Tamen Plu pasintan monaton sukcesis kaŭzi tiom da intereso inter niaj gelegantoj, ke kelkaj el ili eĉ reagis.

Iu demandis min, kie estas skribite, ke Zamenhof diris, ke oni ne povas havi du malsamajn signifojn al la sama vorto, ĉar Zamenhof mem kreis plurajn homofonojn.

Nu, mi sincere petas vian pardonon pro tiu mia eraro, ĉar tre verŝajne ankaŭ Zamenhof kreis homofonojn, sed tamen kaj malgraŭ ĉio ĉi tio, tio pruvas nur, ke eĉ li ne estis perfekta esperantisto kaj tial mi rekomendas tion evitadi. Mi ne intencis insulti iun ajn, sed neniu perfektas, kaj tio inkluzivas d.ron Zamenhof, ĉiujn akademianojn kaj min!

Samtempe mi informiĝis, ke la Akademio neniam diris, ke la sola afikso por landnomoj estas "io". Ĝi indikis, ke ĝia iama malaprobo al "io" estas nuligita, kaj ke la uzado de "io" estas "tolerata", kvankam ne oficiala afikso. Tio pruvas nur, ke ankaŭ la Akademio povas agi ne saĝe!

Mi do rekomendas, ke ni ne imitu tiun uzadon, kvankam ĝi ĝenerale uzatas en Usono kaj Eŭropo. Ni aŭstralianoj rifuzu uzadi ĝin!

Ĉar vortoj kiaj "Francio", kaj "Germanio" estas neoficialaj, mi rekomendas, ke ni uzu ankaŭ ne ilin, ĉar ili estas nebezonataj!!!

Aliaj evidente miskomprenis tion, pri kio mi skribis, raportante pri la elekto al la estraro de AEA dum la jarkunveno en Kianinny. Ili laŭte, se oni povas laŭte skribi, protestis, ĉar mi ne raportis pri la ŝtataj reprezentantoj, pri kiuj mi fakte tiam ne estis informita.

Do, bonege, sed nur ĉar ili insistis, jen la nomoj de tiuj, kiuj reprezentas siajn ŝtatojn en la estraro de Aŭstralia Esperanto-Asocio: Antono Gaskell el Novsudkimrujo; Bernie Heinze el Viktorio; Debra McCarney el Okcidentaŭstralio; Robert Budzul el Tasmanio kaj June Perkins el Kvinslando.

Mankas ankoraŭ reprezentantoj el Nordteritorio, Sudaŭstralio kaj Aŭstralia Ĉefurba Teritorio.

*"Vi kial retrovenas tiom malfrue el via vizito al la urbo?" diris la edzino*

*"Nu, nur ĉar la pastro petegis min, ĉu li rajtas kunveturi kun mi, kaj kompreneble mi tion permesis, sed ekde tiam la ĉevalo komprenis eĉ ne unu vorton, kiun mi diris al ĝi!"*

## Amasa reta instruado en Rusujo

En tri rusaj dissendoserviloj por hodiaŭ estas registritaj 14.948 abonantoj por Esperantaj kaj priesperantaj dissendolistoj. Tio sendube estas senprecedenca kvanto por nia reta informado/instruado. Krome oni devas memori pri preskaŭ mil abonantoj de "Esperanto-kurso" en Yahoogroups.com – alispeca, sed momente la plej efika instruejo - kaj dekoj da rusaj studantoj en Lernu.net.

Ekzistas entute 6 dissendolistoj, prizorgataj de 3 verkintoj: Slavik Ivanov,, Lusi Rimon kaj Andrej Grigorjevskij. Tri dissendolistoj aperas sub diversaj nomformoj sur ĉiuj tri dissendolistaj serviloj, aliaj tri funkcias nur en Content.mailru.

La plej malnovaj kaj stabilaj estas "Novosti", prizorgataj de Slavik Ivanov, iom pli postaj kaj malregulaj estas miaj konatigaj kursoj, lastotempa novaĵo estas mnemonikaĵoj, ludiloj kaj porlernejana kurso de Lusi Rimon.

Kaj eĉ pli lastotempa estas "longa kaj teda kurso", lanĉita de mi en Content.mail.ru – eksperimente, por kontrasto kun sennombraj "gajaj", "rapidaj" kaj "allogaj" kursoj, per kiuj estas plenŝtopitaj la dissendolistaj serviloj. Konsiderante, ke ĝi kreskis je preskaŭ 200 personoj dum la lastaj tri tagoj, ŝajne la titolo ne fortimigis la abonantojn.

*Andrej Grigorjevskij*

*"Mi tiom timas, kiam vi vojaĝas kara Johano."*

*"Ne timu, ne timu, mi retrovenos antaŭ ol vi tion scios."*

*"Jes, ĝuste tial mi timas!"*

## Io pozitiva

Gratulojn kaj bondezirojn al Igor pro la sekvanta: Jam eblas lerni en la universitato de Novsudkimrujo la anglan, japanan, indonezian, francan, germanan ktp. lingvojn. Sed baldaŭ eblos tie lerni ankaŭ ne nur Esperanton, sed ĉefe kiel instrui ĝin!

La kurso estos 6-monata kaj inkluzivos: lingva teorio, historio de lingvoinstruado, teĥnikoj kaj metodologioj de lingva instruado, analizo de diversaj necesoj kaj problemoj de lernantoj, identigado kaj elekto de taŭgaj instrumetodoj, teĥniko kaj materialo, lecionpreparado, specifaj trajtoj kaj problemoj pri la instruado de Esperanto ktp. ktp.

Por pliaj informoj bonestu kontakti Igor de Oliveira Couto prezidanto@esperanto.org.au

## *Tre bonŝanca soldato, ĉu ne?*

*"Oni elĵetis min el la mararmeo."*

*"Sed kial?"*

*"Ĉar ĉiam plaĉas al mi dormi kun malfermitaj fenestroj, sed al la aliaj en la submarŝipo tio tute ne plaĉis!"*

*Diras la dolĉa edzino: "S.ro Jensen ĉiun matenon kisas sian edzinon antaŭ ol li iras laborejen. Kial vi ne faras same?"*

*"Ĉu vi estas freneza? Mi apenaŭ konas ŝin!"*

*Diras la okulkuracisto al la malsanulo:*

*"Vi legu nur la literojn, vi ne bezonas elparoli la vortojn!"*